



Estrara Komunikado EKO 2017-18 sendita el Busano, Koreio, la 18an de julio.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.

Por tuj uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

AMO floras inter niaj instruistoj

Unuafoje Kongreso de ILEI gastigas la AMO-programon de UEA. La 50a Kongreso de nia instruista ligo en Busano, Koreio, gastigas la 38an seminarion pri Aktivula Maturigo (AMO). Unuafoje tiu populara seminaria programo de UEA okazas en Koreio. La seminaria programo disvolviĝas tra kvar kongresaj tagoj, laŭ la sekva skemo:

- 1) Edukado al respekto plena turismo – la malferma prelego kaj posta debato.
- 2) Pedagogia foiro – en la lunda posttagmezo.
- 3) Eksteraj rilatoj – tutmatene marde: Mirejo Grosjean (MG) kaj Duncan Charters (DC).
- 4) Lingva festivalo – posttagmeza programo marde.
- 5) BAFA BAFA – ĵaŭde posttagmeze - spertado de kultura ŝoko: Sylvain Lelarge.

Jen la eroj el la programo pri Eksteraj Rilatoj:

- 1) Enkonduko: kio estas AMO kaj kio estas aktivulo? (MG)
- 2) Celaro kaj bezonoj por trejnado; historio de la AMO-programo (SMG)
- 3) Grupa laboro: kreado de la frapfrazo komence de gazetara komunikado (MG)
- 4) Sintezo de principoj en la kreado de gazetaraj komunikadoj (MG)
- 5) Raporto pri la laboro de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj (MG)
- 6) Kiel plibonigi publikajn parolojn (DC)
- 7) Kiel refuti la kutimajn atakojn al Esperanto – grupa laboro kaj sintezo (DC)

Mirejo Grosjean multon rakontis pri la eksteraj rilatoj de UEA kaj ILEI. La interaga parto de ŝia sesio rilatis al la pretigo de gazetaraj komunikadoj, kiujn okupataj ĵurnalistoj atentis. Ŝi prezentis la kvin ‘s’-ojn, kiuj vendigas gazetojn: sporton, sekson, skandalon, sangon kaj spezojn (monon). Esperanto kutime ne agas sensacie sur iuj ajn el tiuj kampoj; tamen, la unua frazo de komunikado devas elstari kaj kapti tuj la atenton de la ĵurnalisto kaj poste la legantaro. La pare plenumata tasko estis krei frapfrazon pri la nuna kongreso. Inter la rezultoj:

- “Lokulo iris al Koreio kun ses samlandanoj” (por loka revuo en fora lando)
- “Kio estas Esperanto?” (por uzo en Azio)
- “Kio varmis en Koreio?” (por uzo en iom signife malpli varma lando)
- “Kunvenis preskaŭ ducent por diskuti pri Eo-instruado”
- “Kongresis homoj el 20 landoj – sen interpretistoj” (kontraste al APEC-kunsidoj)
- “Lingvaj kaj kulturajn stereotipojn ni disrompis en kongreso de Esperanto en Koreio”

Duncan Charters prezentis la dirojn de Ivo Lapenna pri konvena informado, unuavice en universitataj rondoj. Sekvis pensoj de Humphrey Tonkin pri publika parolado kune kun propraj opinioj pri la temo.

La prezentanto mem realigis la predikatajn principojn pri oratorado, i.a. la neceson koni la ecojn kaj interesojn de la publiko, kapti kaj reteni la atenton, elradii memfidon kaj sincerecon. Diskutita estis la rolo de pretigado por prelego, la akiro de taŭgaj teknikaj kaj akustikaj bezonoj kaj la uzado de klara lingvaĵo je nivelo konvena al la publiko.

Lia dua temo rilatis al refuto de miskredoj pri Esperanto. Li disdonis liston de 14 tiaj antaŭjuĝoj. En tri grupoj la seminarianoj devis elekti po unu antaŭjuĝon kaj diskuti kiel reagi konstrue al ĝi kaj reraporti. La tri elektitaj temoj estas:

- 1) La uzantoj de Esperanto ne estas parolkomunumo; ili estas hobiaj klubanoj.
- 2) La angla jam prenis sian lokon kiel universala lingva-frankao, do ne plu utilas okupiĝi pri Esperanto.
- 3) Maŝintradukado antaŭeniras tiel rapide, ke baldaŭ superfluos lingvolernado.



La diskutgrupoj ekzercas kiel defendi nian lingvon. La gvidanto de la temaro Duncan Charters en oratora pozo.

Tre koncize, la reagoj estis:

- 1) Malkreskas la roloj de kluboj; kreskas internaciaj kontaktoj, ĉu fizikaj, ĉu virtualaj, kaj la homoj formas realan parolkomunumon, eĉ se ĝi ne havas tiom kontinuan ekziston kiom aliaj komunumoj.
- 2) Klare, la angla – aŭ ĝia adaptita formo - ludas interpontan rolon en la mondo, specife en elektitaj kampoj. Sed apenaŭ 20% de la homaro scipovas iugrade la anglan. Restas loko por alternativoj.
- 3) Maŝintradukado ludos ĉiam pli utilan rolon, precipe por akirado de informoj. Sed ĉiam restos bezono por la interpersona dimensio en komunikado.

El la limigita anticipa diskonigo de la programo kaj la abundo de samtempaj kongresaj programeroj rezultis eta sed kapabla plurnacia partoprenantaro. Materialo el la seminario legeblas ĉe <aktivulo.net>, kies sekcio pri AMO facile troveblas. La seminaria realigo daŭras ankoraŭ ĝis jaŭdo.



Fotoj: smg

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj, klingonuloj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.